

Vidindaĵoj en Ĉeĥoslovakujo.

La ĉeĥoslovaka respubliko havas multajn vidindaĵojn, kiuj allogas ĉiam pli multe da turistoj. Sed okazas, ke niaj gastoj eksterlandaj estas malbone informitaj kaj pro tio preterveturas vidindaĵojn, ofte unikajn.

Al tiuj ĉi unikaj vidindaĵoj apartenas la Moravia Karsto, norde de la ĉefurbo de Moravio Brno. En tiu ĉi teritorio, kiu ampleksas proksimume 20 km en kvadrato, troviĝas la fame konata Macoĥa, kiu estas la plej granda abismo de l' mondo. Ĝia ĉefa, orienta muro malleviĝas vertikale centtridek-ok metrojn, do preskaŭ cent-kvardek metrojn. Ĝia plej granda longeco estas ducent-okdek, la larĝeco cent-tridek metroj. La plej konata preĝejo de Vieno, la preĝejo de Sankta Stefano, malaperus en tiu ĉi abismego. Cent-kvardek metrojn ĝi estas profunda kaj vi, estimataj geaŭskultantoj, povas kompari ĝin kun la plej alta turo en via urbo. Jam de longe la tieaj loĝantoj observis strangan fakton. Riveretoj, sufiĉe akvoriĉaj, alfluente al tiu ĉi teritorio, malaperas aŭ subite en funela tertruo, aŭ iom post iom en sablo de la fluejo. Fluinte sub la tero la rivereto reaperas je loko tre malproksima de la malapero. Pro tiuj ĉi strangaj videblaj faktoj la loĝantoj supozis ankoraŭ pli mirandan, ne videblan subteran mondon. Ankaŭ la fakuloj interesiĝis pri tiu ĉi teritorio. Laboroj celantaj la malkovron de la enigmo estis longan tempon sensukcesaj. Iom post iom tamen sukcesis la homo forrabi la sekreton de la Naturo. Al la vizitanto montriĝas fabela subtera mondo, granda labirinto de grotoj, irejoj kaj lagetoj. Kiel koridoron oni plej ofte instalas la iaman fluejon de la rivereto, kiun ĝi traboris tra la ŝtono dum miloj kaj miloj da jaroj. Sed ofte por larĝigi kaj altigi la fluejon, aŭ por fari pli oportunajn vojojn, oni devis uzi bormaŝinojn. Fortan impreson faras al ĉiu vizitanto la grotoj, ornamitaj per multaj miloj da stalaktitoj kaj stalagmitoj brilantaj kiel neĝaj kristaloj dum vintra suntago. La stalaktitoj pendas de sur la plafono kaj kreskas renkonte al ĝiaj antipodoj, la stalagmitoj. Ilia grandeco kaj forteco estas tre diversaj. La plej malgrandaj aspektas kiel akvogutoj, la plej granda havas la konsiderindan longecon de 4 metroj. Kie estis la homaro kaj kiel aspektis la homo, kiam ankaŭ ĉi tiu grandegulo estis gute brilanta? Ankaŭ la formo de la stalaktitoj estas tre varia. Homoj, kiuj havas vivan fantazion, vidas pluvombreton, kurtenon, pigmeon, vazon, sorĉistinon, gardiston k.t.p. Precipe belega estas la tiel nomata "arbareto" formita el proksimume cent longaj, sed tre maldikaj stalagmitoj, kiuj ofte kuniĝas kun siaj kunuloj, la stalaktitoj. Laŭ la juĝo de s-ro Jozefo Szombathy, kustosoj de la ŝtata muzeo en Wien, kiu estas unu el la plej maljunaj esploristoj kaj fakuloj de karstaj regionoj en Eŭropo, la stalagmita arbareto estas unikaĵo, nenie en tia beleco videbla. Ankaŭ la grandeco de la grotoj estas tro varia. La plej granda estas la ĉefa groto, kies longeco estas 96 metroj, larĝeco 44 kaj alteco dudek. Ĉi tiu halo certe sufiĉus por nia tuta Universala kongreso.

La Moravia Karsto estas tre arbariĉa kun belaj pejzaĝoj. Pro tio ĝi estas la celo de miloj da turistoj. Ĝi estas en unu horo atingebla el Brno, aŭ per fervojo aŭ per aŭtobuso. Eĉ el eksterlando mi vidis tie aŭtobusojn, plej ofte el Wien, de kie la ekskurso estas farebla dum unu tago.

Do, vizitante nian respublikon, vizitu ankaŭ la Moravian Karston, ĝuu la belecon de la silentaj ĉarmaj valoj, malsupreniru en la subteran fabelon kaj ekhaltu antaŭ la mirakloj de la eterna Naturo, aŭskultu ĝian misteroplenan rakonton pri pasintaj jarmiloj.

Alia unikaĵo de nia respubliko estas la gejsero en Herlany apud la urbo Košice en Slovakujo. Ĝi estas la sola gejsero en Eŭropo, kiu elpuŝas malvarman akvon. La mirinda fenomeno ripetiĝas ĉiam post dudek-ok horoj kaj la akvo fluego ŝprucas pli multe ol kvindek metrojn alten. Ĝia agadtempo, kiu sin anonciĝas per subtera muĝado, daŭras duonan horon, dum kiu ĝi elŝprucas mil hektolitrojn da akvo. La elŝprucita akvo estas tre saniga kaj pro tio oni ĝin trinkas, kaj varmigita estas uzata en banejoj. La urbeto Herlany kuŝas en arbaroriĉa ĉarna valo, ĉirkaŭita de montetaro, kiu logas al agrablaj ekskursoj.

Ne multaj Eŭropanoj povas fieri pri tio, ke ili vidis praarbaron, veran praarbaron, ne tuŝitan de la Homo. Tamen ĝi troviĝas en la koro de Eŭropo, en la Bohema arbaro, kiu estas la limo inter Bohemio kaj Bavarujo. Ĝian belecon majstre priskribis la germana verkisto Adalbert Stifter en sia literatura perlo Hochwald, en kiu li kvazaŭ pentras per vortoj la belecon de nia Bohema arbaro. Se vi deziras ĝui kelkajn agrablajn horojn, aĉetu la libron Hochwald kaj legu ĝin. Sed, se vi deziras

vidi la praarbaron, venu kaj migru tra la arbaregoj, en kiuj loĝis la Rabistoj de Schiller, ĝoju pri la silenta beleco de la lagoj, aŭskultu kaj komprenu la lingvon de la Naturo en la eterna murmurado de la arbaro.

Mi ne volas paroli pri la mondfamaj banlokoj de nia respubliko: Karlovy Vary, Mariánské Lázně, Františkovy Lázně kaj Píšťany. Ili ĉiuj estas famaj kaj ĉie konataj. Unun el la malpli famaj elektis la esperantistoj kiel sian libertempejon kaj ĉiu partoprenanto volonte memoras la agrablajn horojn pasigitajn en ĉarma Bělohrad. Precipe la eksterlandanoj estis tre kontentaj, trovinte tie amikan rondon esperantan.

Ankoraŭ onu banlokon mi devas menci, Jáchimov, kie miloj da malsanuloj retrovis kaj retrovos sian perditan sanecon banante en la tiea radiumo-aktiva akvo. Du niaj esperantaj vortoj, nome talero kaj dolaro dankas sian devenon de tiu ĉi urbo. En la Mezepoko oni stampis tie arĝentajn moneroj, kiuj estas laŭ la germana nomo do la urbo Joachimsthal ĉie konataj (sub la nomo Joachimsthaler, mallongigite Taler kaj en Ameriko Dollar. La urbo situas en la Minaĵa montaro je la limo de Germanujo. Proksime al la urbo estas la plej alta monto de la montaro, Klínovec-Keilberg, kiu estas mil ducent kvardek metrojn alta. De la supro de la monto oni ĝuas belan vidon je ĉiuj flankoj, vidante tre malproksimen, kie la bluo de la arbaroj kuniĝas kuniĝas kun la bluo de l'ĉielo. La monto estas eportune alirebla de Bohemujo same kiel de Germanujo. Dum la somero la regiono estas vizitata de homoj, kiuj deziras refreŝigi siajn spiritajn kaj korpajn fortojn per promenoj en la sanaeraj arbaroj. Pli romantika estas la parto najbara. Ĝi situas en la nordo de Bohemujo nome tie, kie la rivero Labe forlasas nian respublikon. Vertikalaj kolonoj, multaj arbaroj kaj ĉarmaj valoj, abruptaj deklivoj kaj sukaj herbejoj pravigas ĝian nomon "La Bohemuja Svisujo". En pratempo Bohemujo estis maro. Tie ĉi serĉis kaj trovis la akvo sian elfluejon, traborante la relative molan sabloŝtonon, kreante pitoreskajn grupojn de rokoj. En la nordorienta parto de Bohemujo estas la Montaro de Gigantoj, kie la fantazio de l' popolo kreis centojn da belaj fabeloj. La plej alta monto do tiu ĉi montaro estas la Neĝomonto, kiu estas mil sescent metrojn alta. Ĉi tie troviĝas la fonto de Labe, la ĉefa rivero de Bohemujo, kies akvofalon vi povas admiri. La Neĝomonto kun la muelejo de Špindler, t.e. Hotelo, estas la centro de diversaj sportoj kaj estas la celo de miloj da sportistoj kaj turistoj somere kaj vintre.

Por ni esperantistoj la tuta norda Bohemujo havas ankoraŭ unu specialan allogaĵon. Ĝi havas la plej densan reton delegitan de la tuta mondo. Prenu la jarlibron de la Universala Esperanto-Asocio kaj komparu! Ĉeĥoslovakujo havas relative la plej grandan nombron da delegitoj kaj la plej granda parto troviĝas ĝuste en tiu ĉi teritorio. Do vi povas ĉi tie migradi senzorge kaj ĉie, en ĉiu urbeto kaj ofte eĉ en vilaĝo, vi trovos bonvenantan amikon.

Amatoj de alta alpina mondo kaj alpinistoj vizitas la altajn Tatrujn, Vysoké Tatry en Slovakujo. La plej altaj montoj de tiu ĉi impona montaro estas Gerlachovka kaj Lomnický štít. Ili estas pli altaj ol dumil-sescent metroj. Kvankam ilia pinto troviĝas super la limo de la eterna glacio, tamen iliaj deklivoj estas nudaj, ĉar la rokoj estas tro krudaj, tro abruptaj. Des pli allogaj ili estas por la vivon riskanta alpinisto. El la valo oni ĝuas unikan vidon al la majesta montaro. Nekutime alte en la montaro vin surprizos ĉarmaj lagetoj kun klarega akvo. Pro tio la loĝantoj nomis ilin "Maraj okuloj". Ili estas atestantoj el pratempa glacia epoko, kiam ankoraŭ la valoj kaj montoj estis kovritaj de tavolo de mortiga neĝo kaj glacio. Ĉi tie vi trovos la fame konata lagon Štrbské pleso. Sur ĝiaj bordoj vi trovos unuarangajn hotelojn, kiuj kontentigos eĉ la plej postuleman gaston. La pureco kaj saniga forto de la montara aero kaj la majesta beleco de la montaro, estigis vicon da kuraĉlokoj, kiujn kunligas la Vojo de Libereco – Cesta Slobody. Promenante sur ĝi oni superrigardas la plej grandizan parton de la Altaj Tatruj. Nia belega Tatramontaro – la centro de diversaj sportoj, vintraj kaj someraj – meritas apartan paroladon.

Niaj vidindaĵoj ne estas ĉie konataj, ĉar la internacia turista fluego ankoraŭ ne malkovris ilin. Des pli agrabla estas la surprizo pri la moderaj prezoj, ĉar nia popolo ankoraŭ ne kutimiĝis vidi en ĉiu turisto ne elĉerpeblan fonton da mono.

Kiu el vi, eksterlandaj sinjorinoj kaj sinjoroj deziras senpage esperantan libron kvardekpaĝan kun belaj bildoj pri Moravia Karsto, skribu p.k. Al Radio-Jurnalo en Brno, Ĉeĥoslovakujo, skribu, ke vi aŭskultis tiun ĉi paroladon. Skribu legeble kaj ne forgesu vian adreson.

Mi dankas por via atento kaj deziras al vi feliĉan bonan nokton.

Halo, halo, radio-stacio Brno elsendas koncerton de popola muziko.

Halo, halo, radio-stacio Brno finis sian koncerton de popola muziko. Ni dankas por via atento kaj deziras al vi feliĉan bonan nokton.